

ESPERANTO EN AFRIKO

uea.org/asocio/komisionoj/afrika_agado

Oficiala Bulteno de Afrika Komisiono de UEA | 19a jaro, n-ro 52, 8an de januaro 2025

Enkonduko

Karaj legantoj,

Forpasis la jaro 2024, jaro kiu escepte markis la Afrikan esperanto-movadon per la unua historia universala kongreso en Afriko, io plej grava. Nu, nova jaro venis kaj la Afrika komisiono volas iri pluen disvastigante la uzadon de esperanto en kiel eble plej pliajn landojn en Afriko kaj revigligi la movadon en landoj, kie iam ajn aktivis esperantisto. Tial en tiu ĉi numero, la tute unua ĉefartikolo temas pri "Ni semas", programo kiu ebligas al kiel eble plej multaj aktivuloj ricevi subvencion por subtenisian lokan agadon garantianta la bonan progreson de la movado en la tuta kontinento.

PROJEKTO NI SEMAS

La programo “Ni semas” estas programo de Universala Esperanto-Asocio (UEA), lanĉita en 2015 kiel subvencio-programo por malgrandaj esperanto-projektoj. Ek-de 2022 ĝi estas sub la kunordigado de la Afrika Komisiono de UEA kaj subvencias Esperanto-projektetojn en la Kontinento

Afriko [klaku ĉi tiun ligilon por pli da detaloj](#). Kiel kutime, la Afrika Komisiono de UEA lanĉas alvokon al Afrikaj aktivuloj por kandidatigi siajn projektojn por ricevi subvencion. Jen la ĉijara alvoko :

Ni semas projekto : konkurso 2025



“Ni semas” estas programo de Universala Esperanto-Asocio (UEA), lanĉita en 2015 kiel subvenciprogramo por malgrandaj Esperanto-projektoj. La Afrika Komisiono nun anoncas konkurson por interesaj projektetoj, kiuj bezonas subvenciojn.

Jen ekzemploj de projektoj, kiuj povus peti subvenciojn laŭ tiu programo:

- ◆ Esperanto-kursoj por komencantoj aŭ progresantoj;
- ◆ Seminarioj de trejnado por instruistoj;
- ◆ Ekzamenoj kaj preparado por ekzamenoj;
- ◆ Aperigo de lernolibroj kaj aliaj instrumaterialoj taŭgaj por Afrikaj bezonoj, t.e. en afrikaj lingvoj kaj kun afrikeca enhavo;
- ◆ Kultura interŝanĝo kun aliaj mondopartoj per Esperanto;
- ◆ Monhelpo por sendi materialojn al lernantoj;
- ◆ Informa agado en superaj lernejoj.



**Limdato :
La 31an de januaro 2025**

*Priskribu vian projekton (ne pli longa ol unu paĝo) kaj financa plano de la projekto sur alia paĝo. La financa plano klare indiku la bezonatan sumon: la programo subvencias ĝis maksimume 100 EUR; se la bezonata sumo superas tion, la **projekto-portanto** devas klarigi la fontojn de la alia parto. Sendu al la retadreso nisemas@co.uea.org , kies ricevantoj estas membroj de la Afrika Komisiono.*

La projekto "Ni semas " estas plene financita de Universala Esperanto-Asocio (U.E.A.)

Afrika Komisiono de UEA

INSTRUISTOJ DE LA JARO

Iniciato okaze de la 75-jariĝa jubileo de ILEI en la Zamenhof-Tago 2024 ILEI kun subteno de TEJO invitas Ĉiujn esperantistojn proponi kandidatojn por du kategorioj :

1. "Juna Instruisto de la jaro" (35 jarojn aĝa aŭ malpli, t.e TEJO-aĝo)
2. "Instruisto de la jaro " (pli ol 35 jarojn aĝa)

Kandidatoj plejeble havu :



- ◆ Regularecon en Esperanto-instruado
- ◆ Aktivajn instrumentojn
- ◆ Novigajn alirojn al instruado
- ◆ Historian kaj kulturan konigadon de Esperanto
- ◆ Internacian kunlaboradon
- ◆ Kreemon de instrumaterialojn

- ◆ Longdaŭrajn pozitivajn rezultojn

Al gajnintoj estos donacitaj :

- Atestilo
- Senpaga aliĝo al TEJO-kongreso (ijk) kaj al ILEI-kongreso de la koncerna jaro
- Senpaga membriĝo en TEJO kaj ILEI kun retaj versioj de revuoj Kontakto kaj IPR en la koncerna jaro

- Unu libro flanke de TEJO por la "Juna esperantisto de la jaro"
- Unu libro flanke de ILEI por la "Esperantisto de la jaro"

✓ Rekomendojn (se eble)

Gravaj datoj:

Limdato por kandidatiĝo/kandidatigo: fino de marto 2025

Sciigo al la gajnintoj pri ilia elektiĝo : fino de aprilo 2025

Publika anonco pri la gajnintoj: ILEI-kongreso en 2025. Ni atendas viajn kandidatiĝojn/kandidatigojn!

ILEI-estraro

Zamenhofan Tagon 2024

Por kandidatiĝo aŭ kandidatigo bonvolu sendi jenajn informojn pri la kandidato

al ilei.prezidanto@gmail.com :

- ✓ Personan prezenton
- ✓ Konkretajn atingojn
- ✓ Kontaktinformojn

ESPERANTOLOGIA SEMINARIO EN UNIVERSITATO MODERNA DE LUBUMBASHI

ENKONDUKO



En la forta bezono kongrue kun la fundamenta celo de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) disvastigi esperanton tra la tuta mondo, ni trovas taŭgega la ideon, ke jam estas tempo vastigi la kampon tra la tuta terglobo kie esperanto estu konata, disvastigata kaj parolata. Tute ne

deflankiĝante de nia principa celo kaj aspirante la finan venkon de esperanto, tial ni decidis ke esperanto devas esti instruata ĉu formale aŭ malformale en universitatoj, lernejoj kaj en aliaj edukaj strukturaĵoj sen forgesi klubojn. Pro tio, estante studento en Universitato Moderna de Lubumbashi franclingve (Université Moderne de Lubumbashi) en Lubumbaŝo, dua plej granda urbo de DR. Kongo, mi sukcesis alporti la ideon pri esperantismo al la universitata proprietulo S-ro Grégoire NASIBU, kiu

varme aprezis la ideon kaj konsentis pri la instruado de esperanto en sia universitato. Ĝi estos la unua universitato en Lubumbashi kie oni povos instrui esperanton, la dua en tuta DR. Kongo malantaŭ Universitato Espero de Baraka.

Celoj de la seminario kaj post la seminario

1. Konatigi la Universitaton kun Esperanto Kondiĉoj, promesoj de s-ro GREGOIRE NASIBU
2. Malfermi en-universitatan esperanto-klubojn ĉeestan kaj virtualan Resume pri Grégoire NASIBU : Li estas fakulo pri biologio, politiko kaj estas kuracisto. Li estas la proprietulo de la universitato.
3. Instrui esperanton al studentoj kaj universitataj instruistoj Li proponis, ke :
4. Malfermi solidan kunlaboron inter Universala Esperanto-Asocio (UEA), Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (tejo) kaj aliaj poresperantaj organizoj kun Universitato Moderna de Lubumbaŝo (UML) ♦ Unue necesas okazigi en la jaro 2025 seminarion. Tiuj seminario estu ĝenerale esperanto-kursoj ĉar laŭ li, necesas ke la instruista korpuso inkluzive de li mem kun la administrantaro scipovu esperanton por povi enkonduki ĝin en formalan universitatan instruadon; tial
5. Enradikigi esperanton en formala universitata instruprogramo en UML, Li rekomendis :
6. Ebligi lernado per esperanto en diversaj fakoj, ekz lernado de komputiko per esperantigita komputilo, Se estos bona kunlaboro inter esperanto-organizoj kun UML, ke :
7. Organizado de simpozioj kunlabore kun lokaj universitatoj kiel la famega UNIVERSITATO DE LUBUMBASHI (Université de Lubumbashi). Dum tiuj simpozioj esperanto havu lokon kaj prelegantoj povas esti ĉu esperantistoj aŭ neesperantistoj. a) En 2026 komenciĝos formala esperanto-kurso en universitato. Poentoj pri esperanto-kurso ne aperos en la universitataj dokumentoj de la studentoj, sed okazos tiuj kursoj kaj la instruisto estos pagata. Datalojn pri la formalaj kursoj eblos havi post certeco ke ĉiuj pedagogiaj kondiĉoj estas respektataj.

Kion profitos la universitato ?

Ĝenerale, UML estas relative nova universitato, instruado de ia lingvo, kia Esperanto rolos kiel

varbado de novaj studentoj.

Tamen, la universitato samtempe serĉas partnerojn tra la tuta mondo. Tiu partnereco povas

esti inter-universitata aŭ kun alia organizaĵo kia UEA, TEJO, ILEI, ktp. en diversaj edukaj,

sciencaj aŭ teĥnologiaj fakoj kaj promociado de indiĝenaj lingvoj. UEA kaj TEJO estas la organizoj, kiuj povas malfermi tiujn rilatojn al UML kaj kunlabori tiucele.

Partopreno

Estas antaŭvidite la partopreno de 29 personoj plus la trejnisto 30 geseminarianoj, ĉiuj partoprenantoj estos ĉu studentoj aŭ universitataj instruistoj. La seminariejo estos senpaga ĝin ofertos la universitato, sed pri la cetero, esperantistoj povas zorgi.

SEMINARIISTOJ

Estas finfine decidite ke venu unu trejnisto, estu Jeremie Sabiyumva el Burundo, Estrarano de UEA pri Afriko. Li estas kompetenta paroli nome de UEA kaj kion UEA atendus de UML kiel konkretan sukceson de la tuta plano.

Konklude

Ĉi tiu seminario estas komenco por la efektiva enradikigo de esperanto en privatajn universitatojn, kia UML. Nia alkurata pleja celo estas atingi instancojn kiuj kapablas reklami esperanton kaj disvastigi ĝin al kiel eble plej granda nombro da homoj kaj ebligi kunlaboron inter E-organizaĵoj kaj edukaj strukturaĵoj. La Universitato Moderna de Lubumbashi esperas ne nur organizi tiun unuan seminarion, sed esti unu el la pilieroj de la esperanto-movado en Lubumbashi parte kaj ĝenerale en DR. Kongo. La Universitato estas ankaŭ preta kunlabori en aliaj edukaj kadroj kun Esperanto-organizoj kunlaborantaj kun UEA por disvastigi Esperanton.

Plukresas espero pri la universitata instruado de Esperanto




Krom la rete okazantaj esperanto-kursoj en la universitato espero de Kongo en Baraka, ekĝermas alia esperdona klopodo pri la enradikigo de esperanto en universitaton. Laste renkontiĝis dum UNESKO-konferenco de Ne-Registaraj Organizoj en (NRO-j) en Parizo sinjoroj François Lo Jacomo kaj Pastro Albert Kabugi. Albert Kabugi estas reprezentanto de Don Bosco. Ĝi estas katolika organizaĵo kiuj havas lernejojn kaj plurajn meti-trejnejojn por forlasitaj infanoj kaj orfoj. Dum ilia interŝaĝo, François parolis pri UEA al sia kolego. Mi estis konatigita kun la Pastro kaj dum niaj interŝanĝoj, li ŝajnis interesita kaj eĉ promesis paroli kun siaj katolikaj kolegoj Pastroj kiuj gvidas

la agadojn de DON BOSCO en diversaj lernejoj en Lubumbashi por eventuala kunlaboro pri instruado de Esperanto.

Nia esperpo estas, ke esperanto prosperas nun en altlernejoj kiel en la universitato rektorata de la iama kunordiganto de la afrika Komisiono de UEA UEC (Universite Espoir du Congo) en Baraka Suda kivuo, kaj okaze de sukceso de tiuj ĉi du planoj du pliaj universitatoj akceptos la formalan instruadon de esperanto en DR. Kongo.

Espoir Ngoma Kasati.

PROSPERAS KONGA STELO



Antaŭ kelkaj monatoj la kongolanda sekcio de ILEI kunlabore kun la kongolanda esperantista junulara organizo lanĉis la landan movadan periodaĵon, kiel oficialan informilon de la kongolanda esperanto-movado. Nun, Konga Stelo triafoje aperas kun buntaj artikoloj pri la verkitaj de kongolandanoj. Tio estas la frukto de la kuraĝo de la redaktoro de la periodaĵo s-ro Joel Muhire al kiu ni ĵetas bukedojn

da gratulfloroj. Aperigi revuojn ne estas facile ĉar pli kaj pli malkreskas nombro da verkemaj esperantistoj kaj same malpli kaj malpli venas legemaj esperantistoj. Sed la ĵus aperinta tria numero elmontras emon pluaŭdigi la voĉon de la kongolanda esperantisto spite la travivitan makabran situacion pro la senĉessa militado en la la

orienta parto de nia lando. En la tria numero de Konga Stelo, en paĝo 15, vi povas legi informon pri la komenca jaro de la esperanto-movado en DR. Kongo. Vi povas elŝuti la trian numeron [ĉi tie](#)

Espoir Ngoma Kasati

Raporto pri la Internacia Tago de Paco

Hodiaŭ, la 21-an de septembro 2024, la tuta mondo festas la Internacian Tagon de Paco. Ĝuste en tiu ĉi kunteksto la Prezidanto de DKEA petis ĉiujn Esperanto-klubojn festi ĉi tiun tagon kun siaj membroj kaj invitatoj por popularigi la Esperanto-lingvon. Cadeps klubo, la klubo al kiu s-ro Guy Roger Ileka (Prezidanto de Demokratia Kongolanda Esperanto-Asocio), S-ro Paul Alcée Mazangu (Kultura Konsilanto de DKEA kaj Prezidanto de Cadeps klubo) kaj S-ino Fidélie Kanjinga (Kasistino de DKEA kaj membro de Cadeps klubo) apartenas havis la prerogativon festi ĝin ĉe la "Espace Elite" en la komunumo Lingwala. La tri menciitaj konsistigis la panelon por la hodiaŭa kunveno. Moderado estis farata kune S-roj Paul Alcée Mazangu kaj Guy Roger Ileka kaj la komencan preĝon diris S-ino Fidélie Kanjinga. La du moderigantoj vigligis la publikon per vikleco kaj donis kelkajn bazojn de la lingvo Esperanto. Poste S-ro Guy Roger Ileka faris prezenton pri la historio de la lingvo Esperanto invitante ĉiujn pli bone uzi ĝin. S-ino Fidélie Kanjinga siaflanke parolis pri la historio de la Internacia Tago de Paco, tago kiu estis decidita en

1981 sub rezolucio A/RES/36/67 de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj ĉar la Antaŭenigo de la paco estas unu el la ĉefaj celoj de Unuiĝintaj Nacioj laŭ ĝia Ĉarto. Krome ŝi instigis la membrojn de Kadeps Klubo servi kiel ekzemplon por kontribui finance al la agado de Esperanto, kies vivo estas en danĝero en Demokratia Konga Respubliko ĉar la movadanoj akiris la kutimon kiel eble plej nenion kontribui kaj finance kaj administre. Nun kiam la nuna Ministro de Justeco kaj Gardisto de la Sigeloj petis ĉiujn senprofitajn asociojn kaj ĉiujn religiajn konfesiojn akiri juran personecon, kia estos la sorto de Esperanto se ni ne sukcesos kontribui? Neniu aktiva Klubo povas organizi agadojn en la nomo de Esperanto sub puno de juraj sankcioj. De kie venos la sumo de mil dolaroj aŭ pli por esti en ordo kaj kunveni pace tra la lando sen esti ĝenita? Antaŭ ol fermi siajn rimarkojn, s-ino Fidélie Kanjinga klarigis en kvar naciaj lingvoj kaj en la franca (oficiala lingvo de Demokratia Kongolanda Respubliko) la mesaĝon: "kultivado de la kulturo de paco, per lingvoj por la paco." Daŭrigante la

ceremonion, la Prezidanto de Cadeps Klubo instigis laboremajn membrojn perfektigi sian sciadon de la Esperanto-lingvo por plenigi vakantajn postenojn ene de la estraro de Cadeps Klubo. Antaŭ ol la familia foto estis prenita, S-ro Guy Roger Ileka prezentis s-ron Symphorien Ngoyi Pabishilaki, divizi-estron ĉe la Ministerio pri Kulturo kaj Arto, kiu povos alporti Esperanton al Ŝia Ekscelenco

SinJORino la Ministro de Kulturo kaj Arto kaj S-ro Jean. Decky Kihunsa, altranga raportisto ĉe Konga Nacia Radio kaj Televido, kiu volis raporti pri la agadoj de Cadeps klubo kaj DKEA por Radio kaj Televido. Komenciĝis je la 12:30, la ceremonio por festi la Internacian Tagon de Paco finiĝis je la 14:30. Farite en Kinŝaso, la 21an de septembro 2024.

Augustin Sanduck, Sekretario.

ZAMENHOFA TAGO EN MALAGASIO



Ekskurso, la 14an de decembro 2024 en ASTRO-Andoharanofotsy

Malagasaj esperantistoj



Inaŭgurita en 2005, posedata de la profesoro kaj astrofizikisto Charles Ratsifaritana, la ideo de ĉi tiu observatorio ĉe la supro de la monteto estis omaĝi al Albert Einstein, patro de la moderna fiziko.

PARTOPRENANTOJ

Partoprenis 32 homoj el 6 kluboj

1. El Itaosy Esperanto Klubo : 02 partoprenantoj
2. El Andoharanofotsy Esperanto Klubo : 05 partoprenantoj

El Fiadanana Esperanto Klubo : 05 partoprenantoj

4. el La Klubo de Analamahitsy : 02 partoprenantoj

5. El la Verda Insulo de Esperanto : 13 partoprenantoj

El Manjakaray Esperanto Klubo : 05 partoprenantoj

Ĉiuj partoprenantoj komencis migradon tra la monto de Andoharanofotsy por atingi la lokon “ASTRO”. Kvankam la grimpado estis laciga, ĝi estis samtempe interesa kaj ofertis riĉan sperton, plifortigante la grupon.

Vizito de la loko

La partoprenantoj informiĝis pri la nasko, pri nomoj de diversaj steloj. La respondeculo klarigas pri la sunhorloĝo : Sunhorloĝo estas mezurinstrumento, kiu indikas sunan tempon per la movo de la ombro de la bastoneto sur surfaco, la ciferplato, sur kiu estas spurita aro da tempo-horlinioj) La numero (ĉefe festado de la Zamenhof-Tago ĉe Astro Andoharanofotsy estis sukcesa.



Malgraŭ la fizika elĉerpiĝo de la montogrimpado, la partoprenantoj trovis la sperton memorinda kaj riĉiga. Ĉi tiu tago fortigis la ligon inter esperantistoj kaj revivigis la spiriton de unueco kaj kunlaboro. La partoprenantoj kune kantis esperantajn kantojn, fermante la eventon en ĝoja etoso. Ranja Lydie ZAFINIFOTSY, Prezidantino de la Landa Asocio UME

KLUBO PACA ARMEO DE BUJUMBURA

Enkonduko



La seminario okazis la 20-an ĝis la 22-an de decembro 2024 en la Esperanto-centro en Rumonge. Partoprenis esperantistoj el Buĵumburo, Rumonge kaj Nyanza-Lac. La seminario estis speciala ĉar la Burundaj seminarianoj mem financis la seminarion ek de la komenco ĝis la fino.

Inter la agadoj de la tago estis:

- ◆ Elekto de Fraŭlino Esperanto en Burundo
 - ◆ Ekzameno por komencantoj
 - ◆ Ekskursoj
 - ◆ Tradiciaj dancoj
1. Elekto de Fraŭlino Esperanto kaj Ŝiaj kunuloj:

Sabaton la 21-an de decembro, en bona klimato kaj etoso, la seminarianoj procedis al la elekto de Fraŭlino Esperanto en Burundo kiu povos reprezenti Esperanton en naciaj kaj internaciaj kulturaj aranĝoj, inter la 6 kandidatoj, kiuj batalis por porti la Esperanto-kronon, nur unu knabino nomata MacLean Iradukunda estis elektita fraŭlino Esperanto en Burundo. La unua dualokulo estis Kevine Kwizera kaj la Fraŭlino Populareco Umutoniwase Laila.

2. Ekzameno de Esperanto por Komencantoj

La granda plimulto de la partoprenantoj en la seminario estis komencantoj, ili faris ekzamenon ĉar ili ekde longe studis kaj atendis nur ekzamenon. Ĉiuj ricevis atestojn. Venontjare, ili komencos la kurson por progresanto.

3. Ekskursoj

Dum la seminario, la seminarianoj vizitis diversajn lokojn, nome : la Termala akvon de Mugara kaj Mawimbi. Ili estis feliĉaj partopreni la ekskurson.

4. Tradiciaj dancoj

Dum la seminario, la Burundaj tradiciaj dancoj estis dansita por honori la evento. La seminarianoj montris siajn talentojn. La seminario estis fermita en favora klimato kun vizito al lago Tanganjiko. Mi elkore dankas la burundaj

seminarianoj, kiuj mem financis la seminarion, mi esperas, ke aliaj sekvos la paŝon faritan de la Burundaj esperantistoj.

Aime-Patrick Manirakiza

PENSAĴO PRI LA MOVADO

LA MEKANISMO POR ANTAŬENIGI NIAN TUTMONDAN ESPERANTAN LINGVON

ĜENERALA ENKONDUKO



Esperanto, kreita fine de la 19-a jarcento de **Ludoviko Lazaro Zamenhof**, havas la ĉefan celon esti facile lernebla kaj neŭtrala internacia lingvo, kapabla faciligi komunikadon inter homoj de diversaj lingvoj kaj kulturoj. Kvankam Esperanto ne estas vaste parolata, ĝi havis konsiderindan efikon sur malsamaj niveloj, ĉu kultura, socia, politika, aŭ lingva.

Tamen, progresigi Esperanton en la mondo, kiel internacia lingvo de komunikado, implicas plurajn sociajn, kulturajn, edukajn kaj teknologiajn mekanismojn. Kvankam ĝi estis kreita en la 19-a jarcento por esti lingvo facile lernebla kaj neŭtrala komunikilo, Esperanto restas relative marĝena lingvo kompare kun la ĉefaj mondlingvoj.

Jen superrigardo de ĝia rolo kaj efiko.

ROLO DE ESPERANTO EN INTERNACIA KOMUNIKADO

- **Lingvo de neŭtraleco:** Esperanto estis cerbumita por esti neŭtrala lingvo, sen la politikaj aŭ kulturaj konotacioj kiujn naciaj lingvoj havas. En mondo, kie regas la angla, la ĉina, la hispana kaj aliaj lingvoj, Esperanto proponas alternativon, kiu ne favoras neniun nacion aŭ lingvan grupon,

ebligante pli justan komunikadon inter parolantoj de malsamaj lingvoj.

- **Kultura ponto:** Kiel internacia lingvo, Esperanto permesas al homoj el diversaj kulturoj renkontiĝi kaj komuniki sen pere de lingvo regata de aparta grupo. Tio igas ĝin valora ilo por internacia kunlaboro, vojaĝoj kaj interkulturaj interŝanĝoj.

KULTURA KAJ SOCIA EFIKO

- **Kreado de tutmonda komunumo:** Unu el la plej signifaj efikoj de Esperanto estas la tutmonda komunumo, kiun ĝi kreis, kun milionoj da parolantoj, kluboj, asocioj kaj eventoj organizitaj ĉirkaŭ la lingvo. La Universalaj Esperanto-Kongresoj, organizataj ĉiujare, allogas milojn da homoj el ĉiuj medioj. Tiuj renkontiĝoj iĝas spacoj kie individuoj povas interŝanĝi ideojn, praktiki la lingvon, kaj evoluigi amikecojn trans kulturaj baroj.
- **Evoluo de la Esperanto-kulturo:** Preter la lingvo mem estiĝis vera kultura movado ĉirkaŭ Esperanto. Libroj, filmoj, teatraĵoj, kantoj kaj eĉ videoludoj estis kreitaj en Esperanto, plifortigante ĝian kulturan identecon. Esperanto estas foje konsiderata vektoro de pacifisma idealismo, toleremo kaj internacia solidareco.
- **Movebleco kaj internaciaj interŝanĝoj:** Esperanto faciligis vojaĝojn kaj kulturajn interŝanĝojn. Gastigantaj retoj kiel Pasporta Servo ofertas senpagan loĝadon inter esperantistoj tra la mondo, tiel antaŭenigante kulturajn renkontojn kaj vojaĝojn sen lingvaj baroj. Tio havas rektan efikon al homoj kiuj uzas Esperanton por esplori novajn

kulturojn kaj konstrui internaciajn amikecojn.

EFIKO AL INTERNACIAJ RILATOJ KAJ DIPLOMATIO

- **Lingvo de neŭtraleco en diplomatio:** Kvankam Esperanto ne estas oficiala lingvo en internaciaj organizaĵoj kiel UN, ĝi estis uzata en kelkaj diplomaciaj kunteksto. Kelkaj esperantistaj diplomatoj kaj aktivuloj defendas la ideon, ke Esperanto povus esti neŭtrala kaj justa lingvo en internaciaj rilatoj, permesante al ĉiuj partoprenantoj esprimi siajn ideojn egale, sen ke unu el la naciaj lingvoj ne trudas avantaĝon.
- **Antaŭenigo de lingva egaleco:** Esperanto defendas la ideon, ke ĉiu lingvo havas egalan valoron kaj ke la regado de unu lingvo super aliaj estas maljusta. Esperanto, kiel artefarite kreita lingvo, enkorpiĝas ĉi tiun ideologion de lingva egaleco kaj batalas kontraŭ la lingvaj malegalecoj, kiuj ekzistas en la mondo.
- **Inkludo en iuj internaciaj forumoj:** Esperanto estas foje uzata en konferencoj, seminarioj kaj internaciaj forumoj. Ekzemple, Unesko-renkontiĝoj havis diskutojn en Esperanto, kaj la lingvo foje ĉeestas en tutmondaj sociaj

movadoj, kie ĝi estas rigardata kiel ilo por inkluziveco kaj kunlaboro.

EDUKA ROLO EN LINGVOLERNO

- **Faciligi la lernadon de aliaj lingvoj:** Unu el la grandaj avantaĝoj de Esperanto estas ĝia gramatika simpleco, kiu ebligas al lernantoj rapide konatiĝi kun fremda lingvo. Multnombraj studoj montris, ke homoj lernante Esperanton antaŭ ol studi aliajn lingvojn profitas de la rapideco de lernado de eŭropaj lingvoj, danke al la regula strukturo de Esperanto.
- **Eduka ilo:** Esperanto estis uzata en diversaj lernejoj kaj institucioj por instrui lingvistikon, gramatikon kaj komparon inter lingvoj. Iuj esploroj montras, ke studado de Esperanto helpas studentojn pli bone kompreni lingvajn strukturojn kaj disvolvi siajn kognajn lingvajn kapablojn.

FILOZOFIA KAJ IDEOLOGIA EFIKO

- **Pacifisma kaj humanisma filozofio:** Esperanto ofte estas ligita al humanismaj kaj pacifistaj idealoj. Zamenhof, la kreinto de Esperanto, kredis, ke la lingvo povas antaŭenigi reciprokan komprenon kaj pacon inter homoj. Esperantistoj subtenas la ideon de pli harmonia mondo, kie lingvaj

baroj ne plu estus malhelpo al komunikado.

- **Batalo kontraŭ etnocentrismo:** Estante lingvo ne rilata al reganta kulturo, Esperanto celas kontraŭstari etnocentrismon, la hierarkion de lingvoj kaj la kulturan dominadon. Ĝi enkorpiĝas modelon de paca kunvivado inter malsamaj lingvoj kaj kulturoj, kaj militas kontraŭ la ideo, ke iuj lingvoj kaj kulturoj estas superaj ol aliaj.

EFIKO AL TEKNOLOGIO KAJ KOMUNIKILOJ

- **Ĉeesto en amaskomunikiloj kaj en Interreto:** Esperanto spertas reviviĝon danke al Interreto. Retejoj, diskutforumoj, blogoj, jutubvidbendoj kaj eĉ podkastoĵ haveblas en Esperanto. La lingvo ankaŭ estas uzata en sociaj amaskomunikiloj, kie aktivaj komunumoj de parolantoj interŝanĝas ideojn kaj organizas interretajn eventojn.
- **Uzo en tradukiloj:** Esperanto estas inkluzivita en interretaj tradukiloj kiel Google Translate, kaj foje estas uzata en parolrekonosistemoj. Ĉi tio permesas al la lingvo atingi pli larĝan publikon, precipe inter junaj generacioj, al kutimiĝintaj uzi ĉi tiujn teknologiojn.

LIMIGOJ KAJ DEFIOJ

- **Marĝena lingvo:** Kvankam Esperanto havas solidan bazon de parolantoj kaj subtenantoj, ĝi restas marĝena lingvo. Unu el la grandaj defioj restas ĝia adopto de pli larĝa publiko. La angla, la ĉina, la hispana kaj aliaj lingvoj daŭre regas la mondan scenejon, kaj Esperanto ankoraŭ ne estas konsiderata kiel vere realigebla alternativo por internacia komunikado.
- **Manko de oficiala rekono:** Malgraŭ siaj idealoj de neŭtraleco kaj lingva egaleco, Esperanto ne profitas de oficiala rekono en ĉefaj internaciaj institucioj, kio limigas sian rolon en tutmonda diplomatio.

PLURAJ STRATEGIOJ POVAS ESTI
EFEKTIVIGITAJ POR ANTAŬENIGI ĜIAN
UZON KAJ PLIIGI ĜIAN INFLUON

Jen la strategioj kiuj povas esti necesaj
por ke ni progresigu nian lingvon de
paco kaj unuiĝo tra la mondo:

Edukado kaj lernado

- **Trejnado kaj disvastigo de rimedoj:** Unu el la unuaj paŝoj estas alirebla lernado de Esperanto. Ĉi tio inkluzivas provizi senpagajn retajn kursojn, lernolibrojn kaj moveblajn aplikaĵojn. Platformoj kiel Duolingo, Lernu.net aŭ Kurso

de Esperanto faras lingvolernadon alirebla por miloj da homoj tra la mondo.

- **Edukprogramoj en lernejoj:** Enkonduki Esperanton en edukajn sistemojn per lingvokursoj en lernejoj, altlernejoj kaj universitatoj, aŭ proponado de internaciaj interŝanĝoprogramoj en Esperanto, povas pliigi videblecon kaj praktikon de la lingvo.
- **Atestoj kaj diplomoj:** Antaŭenigi agnoskitajn ekzamenojn kaj atestojn por Esperanto-parolantoj, kiel tiuj ofertitaj de Universala Esperanto-Asocio (UEA), povas instigi homojn serioze lerni la lingvon en akademia aŭ profesia medio.

Amaskomunikilaro kaj kulturo

- **Kreado kaj dissendo de enhavo en Esperanto:** Grava parto de la reklamado de Esperanto implicas la kreadon de enhavo en Esperanto, ĉu filmoj, serioj, libroj, podkasto, muziko ktp. Ekzemple: filmoj kiel Incubus (1966) kaj popularaj Esperanto-kantoj helpas atingi novajn publikojn.
- **Amaskomunikilaro en Esperanto:** La evoluo de retejoj, jutub-kanaloj, blogoj, gazetoj kaj revuoj en Esperanto permesas al tiuj, kiuj regas la lingvon, ligi unu kun la alia kaj akiri informojn en sia

lingvo. Retaj radio- kaj televidstacioj kiel Radio Verda aŭ Esperanto TV proponas ampleksan enhavon por ĉiuj aĝoj.

- **Antaŭenigi Esperanton en kulturaj aranĝoj:** Partopreni aŭ organizi aranĝojn kiel Universalajn Kongresojn de Esperanto aŭ festivalojn dediĉitaj al Esperanto-kulturo estas bonega maniero por pliigi la videblecon de la lingvo en kulturaj kuntekstoj. Ĝi ankaŭ helpas konstrui komunumojn ĉirkaŭ la lingvo.

Komunumoj kaj retoj

- **Plifortigo de lokaj kaj internaciaj komunumoj:** Esperanto estas antaŭ ĉio lingvo de komunikado inter homoj de diversaj kulturoj kaj lingvoj. Kuraĝigi la formadon de kluboj kaj lokaj asocioj de esperantistoj, organizado de internaciaj renkontiĝoj, lingvaj interŝanĝoj kaj Esperanto-ferioj (kiel Esperanto-Restadoj) antaŭenigas ĝian ĉiutagan uzadon.
- **Komunumaj agadoj:** Esperanto estas ofte uzata en internaciaj helpprojektoj, en NRO-oj, solidarecaj movadoj aŭ humanaj agadoj. Tio povas esti maniero integri la lingvon en konkretajn kaj videblajn projektojn.

Teknologio kaj novigo

- **Maŝintradukado kaj komunikaj iloj:** La uzo de Esperanto en modernaj iloj kiel maŝintradukiloj (ekz. Google Translate aldonis Esperanton kiel oficiala lingvo) kaj tujmesaĝiloj (kiel Telegramo aŭ Vacapo) faciligas komunikadon inter parolantoj de malsamaj lingvoj.
- **Integrigo en emerĝantajn teknologiojn:** La evoluo de novaj teknologioj (kiel artefarita inteligenteco kaj voĉaj helpantoj) povus ankaŭ inkluzivi Esperanton en ilia programado. Ĉi tio permesus al la lingvo esti uzata en la plej modernaj kampoj kaj altiri novajn teknikajn uzantojn.

Diplomatia kaj internacia kunlaboro

- **Promocio en internaciaj organizaĵoj:** Kvankam Esperanto ne estas oficiala UN-lingvo, ekzistas pluraj internaciaj organizaĵoj, kiel UEA (Universala Esperanto-Asocio), kiuj pledas por ĝia inkludo en internaciaj komunikadoj. Instigi ĝian uzon en internaciaj renkontiĝoj, konferencoj kaj institucioj povus plifortigi ĝian lokon sur la mondscenejo.
- **Diplomatia uzo de Esperanto:** Kelkaj homoj pledas por Esperanto kiel neŭtrala kaj alirebla lingvo en internacia diplomatia, kaj pluraj

Esperantistaj diplomatoj pledis por ĝia adopto en internaciaj rilatoj.

Komerca kaj profesia aliro

- **Merkatado kaj profesiaj retoj:** Esperanto povas esti promociita en specifaj sektoroj kiel turismo, internacia kunlaboro, aŭ eĉ komerco, reliefigante ĝian neŭtralecon kaj simplecon. Estas firmaoj kiuj uzas Esperanton en sia merkato aŭ kiuj ofertas servojn celantajn la esperantistaron.
- **Karieraj ŝancoj por Esperanto-parolantoj:** Karierevoluo por Esperanto-parolantoj povas esti faciligita de kompanioj aŭ organizoj, kiuj taksas plurlingvajn kapablojn. Liveri laborojn kaj volontulajn ŝancojn en sektoroj kiuj uzas Esperanton estas alia maniero instigi homojn lerni la lingvon.

Komunikaj strategioj kaj konscio

- **Festu aranĝojn en Esperanto:** Organizu konsciajn tagojn, konferencojn, seminariojn aŭ ekspoziciojn por festi Esperanton kaj konsciigi la ĝeneralan publikon. Eventoj kiel Internacia Esperanto-Tago (26-a de julio) aŭ konsciaj kampanjoj povas altiri atenton de amaskomunikiloj kaj sociaj amaskomunikiloj.

- **Ĉeesto en sociaj retoj:** La kreado de interretaj komunumoj sur platformoj kiel Fejsbuko, Instagramo, Tvitero, Reddit aŭ TikTok ebligas kunigi Esperanto-parolantojn, sed ankaŭ allogi novajn lernantojn. Haŝetikedoj kaj interretaj tendencoj ankaŭ povas helpi popularigi la lingvon.

KONKLUDO

Antaŭenigi Esperanton tra la mondo postulas plurdimensionan aliron, kombinate edukadon, teknologion, kulturon, diplomation kaj komunuman engaĝiĝon. Kvankam Esperanto ankoraŭ ne estas vaste parolata lingvo, ĝia potencialo funkcii kiel neŭtrala kaj universala lingvo de komunikado restas grava. Subteno de la tutmonda esperantistaro, integriĝo al novaj teknologioj, kaj promocio sur la internacia nivelo estas esencaj elementoj por ĝia disvastigo kaj evoluo en la venontaj jaroj.

Fine, Esperanto havis rimarkindan efikon, ĉefe kiel ilo por internacia komunikado kaj promocio de idealoj de paco kaj solidareco. Kvankam ĝi ankoraŭ ne estas vaste uzata tutmonde, ĝi daŭre ludas gravan rolon por antaŭenigi transkulturan komprenon, internacian kunlaboron kaj disvastigon de humanismaj idealoj. Ĝi kreis firmegegan tutmondan komunumon kaj permesas al individuoj de malsamaj kulturoj ligi trans

lingvajn barojn. Karaj Esperantistaj gefratoj aktivaj en ĉi tiu mondo, komprenu, ke ĝia efiko superas simplan lingvistikon: ĝi enkorpiĝas revon pri pli egaleca mondo, kie komunikado ne estus malhelpata de lingvaj diferencoj. Miaflanke mi ĉiam aprezis Esperanton ĉar por mi ĝi estus justa lingvo, kiu jam kreis kulturan ponton inter diverslandaj esperantistoj. Se la tuta mondo scius paroli Esperanton, militoj ne povus okazi.

Ĉar nia iniciatinto Ludoviko Lazaro Zamenhof lasis al ni heredaĵon ami unu la alian sen rasa diskriminacio, ĵaluzo, malamo aŭ antipatio.


Via Honoré Sebuhoro el Norda Kivu/DR Kongolando!

Forpasis Colin Beckford en Sud-Afriko

Saluton

Mi ploras informante al vi la forpason de nia karmemora Colin Beckford kiu servis por pluraj jardekoj kiel kasisto de la Esperanto-Asocio de Sud-aAfriko (EASa). La agado de Colin Beckford estis kerna por EASa kaj perdi lin estas ploriga. Tamen estas multo por festi dum lia vivo inter ni kaj por lia sindonemo por esperanto. Colin Beckford forpasis vendrede la 3an de januaro 2025. Mi vidis lin ĝuste antaŭ Kristnasko por diskuti la movadon, familiojn, ekzemple kiel li pasigos Kristnaskan kaj novjaran festojn. Li estis relative forta sed malsana, bedaŭrinde, ke li jam ne estas!

Restu en eterna paco, ho karmemora Colin Beckford, vi estis ne nur samideano, sed ankaŭ persona amiko kaj sendube amiko de la tuta Esperanto-komunumo en Sud-Afriko. Dankon pro viaj jaroj inter ni sur tero kaj pro via elstara sindonemo al la esperanto-movado.



*Elysée Byelongo,
ekskunordiganto de Afrika Komisiono*

Afrika Komisiono de UEA kaj la Redakcio

La redakcio anoncas

Esperanto en Afriko estas dumonata oficiala periodaĵo de la Afrika Komisiono de UEA sciiganta pri la esperanto-movado en Afriko.

Redaktis: Espoir Ngoma Kasati, Lubumbashi, DR. Kongo.

Telefonnumero : (+243) 972 716 042, BP : 1023. Kion faras vi aŭ via landa asocio aŭ via loka esperanto-klubo en via loĝurbo? Bonvolu verki artikolo(j)n. La redakcio akceptas ankaŭ surpaperigitajn artikolojn.

Bonvenaj kompreneble estas viaj sugestoj, konsiloj, komentoj pri tiu ĉi periodaĵo; vi povas komuniki kun la redakcio sendante vian mesaĝon aŭ artikolon al espoirkasati@gmail.com

Limdato por sendi vian artikolon estos je la 8a de marto 2025 .

MEMBRO DE LA AFRIKA KOMISIONO DE UEA

S-ro Aimé-Patrick MANIRAKIZA

(Kunordiganto), el Burundo

S-ro Koffitche Koufiounou

(Ĝenerala Sekretario), el Togolando

S-ro Espoir Ngoma Kasati,

(vicsekretario), el DR.Kongo

S-ino Miora Raveloharison

(Komisionanino), el Madagaskaro

S-ro John Magessa

(Komisionano), el Tanzanio

S-ino Ranja Robertine Jean

d'Arc Zafinitots (Komisionanino), el Madagaskaro

ENHAVO

Enkonduko.....	1	Plukresas espero pri la universitata instruado de	
PROJEKTO NI SEMAS.....	2	Esperanto.....	7
Ni semas projekto : konkurso 2025.....	2	PROSPERAS KONGA STELO.....	7
INSTRUISTOJ DE LA JARO.....	3	Raporto pri la Internacia Tago de Paco.....	8
ESPERANTOLOGIA SEMINARIO EN		ZAMENHOFA TAGO EN MALAGASIO.....	9
UNIVERSITATO MODERNA DE		KLUBO PACA ARMEIO DE BUJUMBURA..	11
LUBUMBASHI.....	4	PENSAJO PRI LA MOVADO.....	12
Celoj de la seminario kaj post la seminario. .	5	Forpasis Colin Beckford en Sud-Afriko.....	18
Kion profitos la universitato ?.....	6	Afrika Komisiono de UEA kaj la Redakcio.....	19
Partopreno.....	6	ENHAVO.....	20
Konklude.....	6		